

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Informoj pri Brno - Gravuloj

František Kožík

Miroslav Malovec

František KOŽÍK naskiĝis la [16-an de majo 1909](#) en [Uherský Brod](#). Inter [1919](#) kaj [1925](#) li studis ĉe la okjara [gimnazio](#) en [Uherské Hradiště](#), la studon li finis en [Brno](#), kie li abiturientiĝis en [1927](#). En Brno li poste studis ĉe la [Fakultato de juro](#) kaj la [Fakultato de filozofio](#) de la [Masaryk-Universitato](#).

Inter [1933](#) kaj [1940](#) li estis radioreĝisoro ĉe Radiojournal Brno, kie li preparis multajn programojn, ĉefe por junularo. Lia plej sukcesa verko estis opereto *Sur rozoj sternite*, kiun li verkis kun Bohumír Polách. Li mem tiam uzis pseŭdonomon Jiří Žalman, do sub tiu nomo li aperis sur afiŝoj. La muzikon komponis Jaromír Weinberger. En tiu periodo laboris ĉe Radiojournal Brno ankaŭ esperantlingva elsendado, kiu ricevis nomon Verda Stacio. Ĝi elsendis prelegojn, informojn kaj ankaŭ koncertojn, teatraĵojn, operetojn kaj operojn. Ne ĉio estis elsendata rekte el Brno, kelkajn programojn elsendis ankaŭ Praha, Bratislava, Hradec Králové kaj Moravská Ostrava, sed Verda Stacio estis kvazaŭ tegmento por tiuj elsendoj.

En Brno formiĝis aktora grupo TRAKT, en kiu aktivis ne nur František Kožík kun sia edzino aktorino Zdenka Švábíková, sed ankaŭ tiel signifaj aktoroj kiel Karel Höger, Vladimír Leraus kaj Jarmila Kurandová. Inter famaj esperantistoj estis tie Marie Strejčková kaj ŝia filo Jiří Vítězslav Šamla kaj Theodor Kilian. La menciita opereto *Sur rozoj sternite* havis similan sukceson ankaŭ en esperantlingva traduko de J. V. Šamla.

Sed la ĉefa signifo de František Kožík baziĝas en verkado de biografiaj romanoj de gloraj personoj de nia kaj monda historio. La vicon startigis en 1934 radio-teatraĵo Christobal Colón, kio estas la portugala nomo por Kristoforo Kolumbo, kaj romano La plej eminenta el pierotoj en 1939 pri la franca majstro de pantomimo Debureau, kiu estis de ĉeĥa deveno. La libro estis elektita kiel la plej bona ĉeĥa romano de tiu jaro, kvankam kritikistoj riproĉas multajn mankojn. Tamen ĝis nun ĝi estas la plej sukcesa verko de Kožík, kiun Ĉeĥa Televido filmigis kiel serialon kaj Jiří Karen esperantigis (la traduko estas legebla en la interreto).

En la sekva jaro 1940 Kožík publikigis romanon pri la portugala poeto Camoes, kies ĉefverko Luzidoj estis sukcese esperantigita. Ĝi rakontas pri la vojaĝo de granda malkovrinto kaj navigisto Vasco da Gama. La romano priskribas la aventuran vivon de la poeto, kiu plurfoje riskis morton nur por savi la manuskripton de sia amata poemego.

La du verkoj aperis en la tempo de protektorato kaj siamaniere batalis kontraŭ la faŝisma okupacio de nia lando, emfazante la patriotismon de la herooj. Tiu trajto de liaj biografioj estis ofte kritikata kiel sentimentaleco.

Post la milito Kožík bildigis la vivojn de Josef Mánes, Komenio, Cervantes, Kryštof Harant, Leoš Janáček, pentristo Jaroslav Čermák, Josef Kajetán Tyl, pentristino Zdenka Braunerová, Karolo la IV-a, aktoro Eduard Vojan, Rudolf Těsnohlídek kaj markizo de Sade. La romanon pri Komenio esperantisgis Zdeněk Rusín kun mia helpo, eldonis ĈEA en 1992 okaze de 400-a datreveno de la naskiĝo de la Instruisto de Nacioj kaj patro de la ideo de internacia lingvo.

Sed František Kožík verkis ankaŭ historian romanon Super valoj mateniĝas, kies heroo, hetmano Šarovec, estas elpensita persono, sed la legantoj kredis, ke li estas efektiva bravulo vivinta en la 17-a jarcento en la naskiĝregiono de František Kožík, ĉirkaŭ Uherský Brod. La romanon esperantitigis Josef Vondroušek, sed ĝi ekzistas nur en lia manskribaĵo. Inter la verkoj de Kožík ni trovas ankaŭ librojn kaj radioprogramojn pri sporto, fabelojn kaj aliajn laborojn por infanoj. Ekzemple la fama filmo Ses ursoj kun Cibulka estis verkita laŭ lia Cirko ĉe Tri Sunfloroj. Plie li ankaŭ tradukis en la ĉeĥan el la bulgara kaj el la franca.

Li mortis la 5-an de aprilo 1997.

Mi fieras, ke mi iomete korespondis kun F. Kožík en liaj lastaj monatoj kaj posedas kelkajn poŝtkartojn skribitajn per lia mano. Post lia morto mi korespondis kun lia vidvino, la dua edzino Olga Horáková, kiu sendis al mi tekston de sia teatraĵo *Epizodo komencas*, kiun elsendis Verda Stacio en 1949 (tradukis A. Slanina) kun Karel Höger en la ĉefa rolo. Ŝi esprimis deziron, ke ni esperantigu la libron pri Janáček, sed tio ankoraŭ ne realiĝis. Poste vizitis min fratino de František Kožík, loĝanta en Brno, kaj invitis min al sia domo por rakonti pri la frato. Sed ankaŭ ŝi jam forpasis.